

B.45

Nº 2.

1ª de Aprilo 1913.

La traduko kaj publikado de niaj artikoloj estas permesata, nur sciligante la devenon



# REVUO

DE

# ESPERANTA PSIKISTARO



La sola vere internacia, kunlaborada revuo traktanta pri ĉiuj psikaj sciencoj, (magnetismo, hipnotismo, spiritismo, universalismo, telepatio, k.t.p.) en Esperanto.

*Redakcio - Sekr. :* A. STAS

*Bureau International du Spiritisme*  
Waltwilder par Bilsen

Belgujo

## ENHAVO

Alvoko, 'Komunikaĵoj, k.t.p.

Raporto.

Ankoraŭ pri mediuma desegnado (Henriĵk Münch).

Universo kaj Rondirado (J. Novotn'y).

Postmorta inspirita poeziaĵo (D. Skalkowski).

Internacia frata kanto (J. C. Chaigneau).

**NI RICEVIS LA SEKVANTAĴN INTERESAĴN  
PUBLIKAĴOJN**

URBO

Normanda Stelo, Dec. '12	Rouen, Franc.
Brazila Esperantista, Jul./Aŭg. '12	Rio de Janeiro.
The Spiritual Journal, Dec. '12	Boston
La Vie Future, Nov. '12	Alger
Reformador, Dec. '12	Rio de Janeiro
Le Fraternaliste, 17-24 Okt. 20 Dec. '12	Douai, Franc.
Ukraina Stelo, Jan. '13	Kolomija, Austrio
Bulletin Officiel du Sp., Dec. '12	Waltwilder, Bilsen, Belg.
Ondo de Esperanto, Jan. '13	Moskvo
Annales des Sc. Psych, Dec. '12	Paris
A Epoca, 22 Dec. '12	Rio de Janeiro
Volga Stelo, Dec. '12	Saratov
Self Culture, Nov.-Déc. '12	Kizhanattam
Holanda Pioniro, Jan. '13	La Hago
Luce e Ombra, Dec. '12	Romo
Kataluna Esperantisto, Jan. '13	Sabadell
The Spiritual Journal, Jan. '13	Boston
Luz y Union, Jan. '13	Barcelona
Konfidenciulo, Febr. '13	Kiel (Germ.)
Ondo de Esperanto, Febr. '13	Moskvo
Holanda Pioniro, Febr. '13	La Hago
Les Nouveaux Horizons, Febr. '13	Douai (Franc.)
Le Monde Espérantiste, Jan. '13	Paris
Normanda Stelo, Nov. '12	Rouen
Esperanza, broŝuro	Guadalajara
Fitagoras, Jan. '13	Meksiko
Lumen, Jan. '13	Tarrasa (Esp.)
Reformador, Dec. '12 Jan. '13	Rio de Janeiro
Studo pri la Organizo de Esperanto	Paris
La Verda Standardo, Jan. '13	Eger (Hungar)
Self Culture, Jan. '13	Kizhanattam
Le Fraternaliste, 14 Febr.	Douai
Karaktero, J. M. Van Stipriaan Luiscins tradukis J. L. Buijn.	Hago-Holando
Antaŭen, Febr.	Hamburgo
Le Théosophe, 16 Febr.	Parizo
Kataluna Esp., Febr.	Sabadell
Le Fraternaliste, 21 Febr.	Douai
Luce e Ombra, Jan.	Romo
Volga Stelo, Jan.	Saratov
The Spiritual Journal, Febr.	Boston

La traduko kaj publikado de niaj artikoloj  
estas permesata nur sciigante la devenon

# Revuo de Esperanta Psikistaro

TRIMONATA PSIKISMA GAZETO

## ABONPREZO

Sm.	1.00
F.	2.50
M.	2.00
	2/
§	0.50
Rubl.	1.00

KOMPRENAS

KOTIZAĴON

AL

**ESPERANTA  
PSIKISTARO**

Honora Prezidanto

R<sup>o</sup> E. BOIRAC

La sola vere internacia, kunlaborada  
revuo traktanta pri ĉiuj psikaj sciencoj  
(magnetismo, hipnotismo, spiritismo,  
universalismo, telepatio, k. t. p.) en  
Esperanto.

## ENHAVO

Alvoko, Komunikaĵoj, k. t. p. — Raporto.  
— Ankoraŭ pri mediuma desegnado (Hen-  
rikk Münch). — Universo kaj Rondirado  
(J. Novotn'y). — Postmorta inspirita poe-  
ziaĵo (D. Skalkowski). — Internacia frata  
kanto (J. C. Chaigneau).

## Redakcio kaj Administracio

Sekretario A. STAS

*Bureau International du Spiritisme*  
**Waltwilder par Bilsen, Belgujo**

Iniciatinto J. C. CHAIGNEAU,  
PARIS, 6, rue de Douai

*Komitatanoj :*

AMIKEJO — K. Schriewer, Légation de Belgique  
Pekin-Chine.

HISPANUJO — D. J. de Nogales, Ciudad Rodrigo.

GERMANUJO — Meiler, Nordendstr., 34, München.

AUSTRIO — D<sup>o</sup> Rosenstock, Krakovo.

BRAZILIO — J. Machado Tosta, Telegraphos, Rio.

ĈILUJO — D<sup>o</sup> Fraga, Prez. de Cila Esp. Asocio,  
Santiago de Chile.

USONO — D<sup>o</sup> Schubert, North Capitolstr. Was-  
hington. D. C.

MORAVIO — Joza Mares, Luhacovice, (Banloko).


Ĉekbankkonto 563.



# ENSPESOJ

	Abon- prezo frankoj	Mona helpo frankoj
Stato je la 1 <sup>a</sup> de Jan. 1913.	110.00	13.30
S <sup>o</sup> Pedro Ramón y Cajal, Blancas, 4, Zaragoza.	2.50	
» E. Artigas Trigo, Armas, 36, Zaragoza.	2.50	
» E. Gastón Ugarte, D. Jaime, I. 68, Zaragoza.	2.50	
» A. Caetano Coutinho, Araxá, Minas Geraes, Brazil.	2.50	
» S. Surovcef, Fabrika Poljakova, Scelkovo, Moskv.	2.50	
» V. Nejinskij, Vazil. Ostr. 9, 4, 12, Peterburg.	2.50	
» Henri de Coppet, 179, Bld Pereire, Paris.	2.50	0.25
» Ant. Kudela, oficisto, Roznov, p. R. Moravio.	2.50	
» D <sup>o</sup> Alvaro Rodovalho Marcondes dos Reyes, Rua Marquez de Abrantes, 52, villa Parana, casa V, Rio de Janeiro.	2.50	
» Renato Guimaraes, Rua Capitaó Rezende, 83, Meyer, Rio de J.	2.50	
» Dr. Ant. Stan. de Almeida Cunha, Telegrapho Nacional id.	2.50	
» Dr. Alberto Couto de Souza, Rua Roso, 41, Laranzeiras id.	2.50	
» João J. da Silva, Rua Alice Figueireda, 67, Riachuelo, Rio de Janeiro.	2.50	
» Dr. Venantio da Silva, rua Mana, 98, Meyer, Rio.	2.50	
» D <sup>o</sup> Nuno Baena, Ave. Maracana, 423, id.	2.50	
» D <sup>o</sup> João Lustosa, rua Baptista de Oliveira, 55, Sobrado, <i>Juiz de Fora</i> , Minas, Brésil.	2.50	
M <sup>me</sup> Diou Trouillon, 145, Bld Malesherbes, Paris.	2.50	
S <sup>o</sup> A. M. Ebelman, O-vo Masinostroït Zavoda Ludvig Nobel S. Peterburg.	2.50	
» Isidro Nuez-Merced, 6, pral. da, Valladolid.	2.50	
<b>Federacio Spiritista Belga, 40 abonoj</b>	<b>100.00</b>	
S <sup>o</sup> Dirceu Caetano de Oliveira, Dep. da Adm. do Ministerio da Guerra, Rio de Janeiro.	2.50	
S <sup>ino</sup> Paulino Bandeira, rua Bella de S. João, 87, Rio de Janeiro.	2.50	
S <sup>o</sup> Flavio Norte, Av. Rio Branco. 39. 2 andar, Rio de Janeiro.	2.50	
» Alcindo Gomes Terra, rua Bento Gonçalves, 66. Eugenio de Dentro, Rio de Janeiro	2.50	
» João Lucas de Azevedo, rua Visconde de Itauna, 287, casa II, Rio de Janeiro.	2.50	
» Dr J. B. Mello Souza. Praça dos Governadores, 8, Rio de Janeiro.	2.50	
» Major Lauriano das Trinas, Contabilidade do Ministerio da Guerra, Rio de Janeiro.	2.50	
D <sup>a</sup> Ilka Maas, rua Barao da Petropolis, 216, Rio de Janeiro.	2.50	
S <sup>o</sup> Alvaro Antonio da Rocha, rua Theophile Ottoni, 74, Rio de Janeiro.	2.50	
» Josefus Chant-Lipes, 880, Bedford Ave, Brooklyn, N.-Y.	2.50	
» H. T. Bailey, 31 Caversham road, Kentisch Town, London.	2.50	

	Abon- prezo frankoj	Mona helpo frankoj
S <sup>o</sup> Creston C. Coigne, 2157, East Cumberlandstr. Philadelphia 16 th. 45 A.		1.25
» Aleks. Bolesl. Brzostowski, Str. Krucza, 9, Varsovio.	2.50	
S <sup>ino</sup> N. Engeling, St. Annastraat, Nijmegen, Holl.	2.50	0.50
S <sup>o</sup> Mélt. Szantmarjay Dersö, Budapest, 3, II I/IX Bakacs. u.	2.50	
» D <sup>o</sup> Béla de Racz, Fehervari ut. 21, Budapest, I.	2.50	2.72
» P. Stojan, B. O. 17. lin 68, K. 25, St. Peterburg, Rusujo.	2.50	
» Jar Posmurny, instruisto, Dolni Slivo, Bohemujo, Austrio.	2.50	
» D. J. de Nogales, Ciudad Rodrigo, Espana.	2.50	10.—
» Fröken Noll, ce soj Höstkay, Filo, Bredgade, 35, Kopenhago.	2.50	
» S. F. Krejeburg, St Parsianovka, Ju. V. J. S. Selskohozjajstven- noe uc.	2.50	
» J. C. Chaigneau, Paris.		7.—
» M. Perrin, 105, rue de Meaux, Paris.	2.50	
» H. Hyams, « Terval Paington » Devon, England.	2.50	
S <sup>ino</sup> H. Diou Trouillon, Bld Malesherbes, Paris.		2.50
S <sup>o</sup> C. E. Heroux, Rue St. Roch, Trois-Rivières, Canada.	2.50	
» Michelis di Rienzi, 20, Av. Reille, Paris.	2.50	
» Anatol Koh, Marszalkowska, 36, log. 7, Varsovio.	2.50	
» Marcolino José Monteiro Estado de Sarana, Ponta Grossa, Brazil.	2.50	
» Luis Antonio Coelho Monteiro, Rua Barao de Maua, 67, Nictheroy Estado do Rio.	2.50	
» Manoel Custodio de Aranjó, Sao José do Rio Preto, Estado do Rio.	2.50	
» Ismael Gomes Braga, E. de Minas. E. Terro Leopoldina Teixeiras.	2.50	
» Francisco de Almeida, S. Joao da Bocaina. E. de S. Paulo.	2.50	
» Manoel dos Santos Lostada, E. de Santa Catharina, Florianopolis	2.50	
» Giovanni Leoni, Rua da Alfandega, 73, Rio de Janeiro.	2.50	
» Antonio José Ferreira, Correis de Cachoeira, Villa Jatahy do Norte. E. de S. Paulo.	2.50	
» Abel Gomes, E. de Minas, Uba.	2.50	
» Antonio Baptista Torres, Teixeira, E. de Minas.	2.50	
» Paulo José da Rosa, Rua Florencio de Abreu, 24, S. Paulo.	2.50	
	<b>350.00</b>	<b>37.52</b>



# ALVOKO

de

## ESPERANTA PSIKISTARO

Nun la **longtempe dezirita**


### REVUO DE ESPERANTA PSIKISTARO

ekzistas kaj ĝia prosperado nur dependas de la kunlaborado de *ĉiuj duoble samideanoj*, magnetistoj, hipnotistoj, spiritistoj, telepatiistoj, universalistoj, ktp.

*Ĉiuj psikistoj* kiuj okupiĝas pri Esperanto kaj ĉiuj aliaj kiuj aprobas ĝian celadon **devas nepre aboni** kaj sendi al ni artikolojn, ĉu esperante, ĉu nacilingve verkitajn.

La Sekretario

A. STAS



## INTERNACIA SPIRITISTA KONGRESO DE ĜENEVO

*La dua Internacia Kongreso Spiritista, organizata de la Int. Oficejo okazos en Ĝenevo de 11 ĝis 14<sup>a</sup> de Majo 1913.*

La plej gravaj naciaj kaj internaciaj societoj spiritistaj de la tuta mondo sendos tien siajn delegitojn ; ankaŭ Esperanta Psikistaro sendos raporton pri sia movado.

PROGRAMO :

### 1<sup>o</sup> Teoriaj demandoj.

- A) Rolo de Spiritismo en la religia evolucio de la homaro.
- B) Praktiko de la mediumeco.
- C) La spiritista gazetaro.

### 2<sup>o</sup> Laŭvolaj demandoj.

Vizito al la laborejo de la fame konata mediumino Hélène Smith. Organizo de internacia mediuma ekspozicio (pentraĵoj, pasteloj, desegnaĵoj, fotografaĵoj, ktp.)

Sendiĵoj por la Kongreso al

S<sup>o</sup> A. PAUCHARD, 23, Rue Tronchin, Genève.

**Oni korespondas France, Angle kaj Esperante.**

Raporto de la Sekretario  
pri la agado de  
ESPERANTA PSIKISTARO  
dum la pasinta jarkvarono

Post la apero de la unua numero de la « Revuo » alvenis granda nombro da aliĝoj, dank' al la klopodo de niaj sindonemaj duoble samideanoj. Precipe al nia nelacigebla amiko José Machado Tosta Esperanta Psikistaro ŝuldas multan dankon, ĉar li varbis ne pli malmulte ol 29 novajn anojn, kiel videble en la apudanta listo de enspezoj. Ni ne povas preterlasi tie ĉi diri ke ĝis nun S<sup>o</sup> Tosta anigis 53 personojn al Esperanta Psikistaro. Ni nur esprimas la deziron ke ĉiuj el ni klopodu por atingi egalan rezulton.

S<sup>o</sup> Gaston Ugarte el Zaragoza varbis 3 abonojn.-Dankoj.

Parolante pri la kursoj de Esperanto ĉe la Psikistoj, mi ree devas citi la nomon de nia amiko J. Machado Tosta, kiu organizis kurson ĉe la Spiritista Societo de Rio de Janeiro.-Gratuloj.

Ĉiuj niaj duoble samideanoj legos kun granda plezuro la sekvantan komunikaĵon de nia Majstro :

*« Kun plezuro mi ricevis la unuan numeron de la bela  
« REVUO DE ESPERANTA PSIKISTARO », Mi sendas  
al vi mian koran dankon. Al la Revuo mi sendas miajn  
plej bonajn dezirojn ».*

Via L. L. ZAMENHOF

Finante ni devas diri ke la ideoj, kiujn ni defendas, estas preskaŭ ĉie mokitaj pro nekompreno, kaj por iĝi venkontoj de la mokantoj, ni devas labori metode, fidante la sukceson, por disvastigi niajn ideojn. Estas, ni povas diri, batalo, inter tiuj kiuj *kredas havi* la finan veron kaj tiuj kiuj *serĉas* la finan veron. Se moko estas permesata mi povas aldoni ke la kredantoj havas la veron *laŭ* sia kredo ; oni povas tiel kompreni kiel personoj povas koncepti finan veron tute malsimilan ol alia, eĉ provante altrudi *sian* finan veron al la alia.

Klopodu, duoble samideanoj !!


La Sekretario  
A. STAS.



## KOMUNIKAĴOJ

S<sup>o</sup> Schmiedeberg estis erare enskribita en la liston de la anoj de Esperanta Psikistaro ; bonvolu streki tiun nomon el la listo.

En la 1<sup>a</sup> numero la nomo de S<sup>o</sup> J. Machado Tosta estis erare skribata « Fosta » ; bonvolu korekti.



## ENSPEZOJ

Je la 1 <sup>a</sup> de Januaro 1913 . . . . .	Frs 123.30
Abonoj . . . . .	" 240.—
Monaj helpoj . . . . .	" 24.22
	<hr/>
	Frs 387.52


je la 1<sup>a</sup> de Aprilo 1913

## ELSPEZOJ

Je la 1 <sup>a</sup> de Januaro 1913 . . . . .	Frs 244.—
Poŝtelspezoj por la 1 <sup>a</sup> N <sup>o</sup> de la Revuo	} . . . . . " 7.—
(forĝesitaj en la antaŭa listo)	
Preselspezoj id. . . . .	" 55.—
Cirkulero id. . . . .	" 25.—
Malgrandaj elspezoj . . . . .	" 2.25
Aliĝo U E A . . . . .	" 5.—
Komisioj . . . . .	" 2.10
Poŝtelspezoj Decembro . . . . .	" 7.50
" Januaro . . . . .	" 15.—
" Februaro . . . . .	" 10.—
" Marto . . . . .	" 10.—
2 <sup>a</sup> Numero de la Revuo, preskosto . . . . .	" 80.—
Sendkostoĵ . . . . .	" 30.—
	<hr/>
	Frs 546.16

je la 1<sup>a</sup> de Aprilo 1913

**Deficito Frs 158.64**





## Ankorau pri media ma desegnado

Kvankam la legantoj jam legis en la unua numero de nia revuo la paroladon de Sr<sup>o</sup> Mareŝ, kaj eksciis multajn detalojn pri tiu temo, mi pensas, ke estas interese legi mian raporton, ĉar ĝi estas montronta iom alian staton de la medio, ol ĝi en la citita loko estis priskribita. Tio estu nova pruvo por la fakto, ke ankaŭ la media ma desegnado ne okazas ĉiam en absolute samaj cirkonstancoj.

En la unua duono de januaro, mi visitis tute hazarde en Berlino la societ<sup>o</sup>n de germanaj psikistoj Sphinks. Ilia plano estas identa kun tiu de Esperanta Psikistaro.

Post parolado, kiun mi bedaŭrinde ne aŭdis, estis desegnota virina medio. Sinjorino A., posedantino de ĥemia purigejo, estas virino, ankaŭ absolute ne scianta desegni en la kutima stato. Antaŭ ŝi kuŝis duonkvadratmetra folio desegnopapera kaj multaj koloraj kraĵoj, kiujn ŝi malrapide pintigadis. Kiam tiu ago estis finita, ŝi devis entranciĝi, kaj tion ŝi faris mem. Ŝi metis la kolorkraĵojn en la maldekstran supran angulon kaj ekatendis. Dume fariĝis silento en la ĉambro kaj la esprimo de ŝiaj okuloj malklariĝis, ŝi rigardis ien, en nebulan malproksimon.

Post kelka tempo ekmoviĝis ŝia mano kaj facile trakuris ĉiujn kvar flankojn de la folio, fine ĝi faris diagonalon. La medio komencis desegni iajn strangajn kreskaĵajn konturojn. Komence la afero iris sufiĉe mallerte kaj malrapide. Dume profundiĝadis la tranco, kaj ju pli profunda ĝi estis, des pli graciaj iĝadis la formoj, des pli rapide kaj certe moviĝis ŝia mano. Baldaŭ ni rigardis du florajn motivojn, desegnitajn en nur du diversaj koloroj.

Tio estis nur antaŭdesegno servanta por entranciĝi sufiĉe profunde, kaj ĝi daŭris proksimume dek minutojn. Nun oni donis al ŝi novan folion kaj ŝi rapide kaj senpripense ekdesignis strangajn kaj tamen harmoniajn konturojn de ia kreskaĵo. Poste ŝi kolorigadis la formiĝintajn foliojn, metante tre zorge makuleton apud makuleto, ŝanĝante ofte la kraĵojn. La esprimo de ŝia vizaĝo estis ĉiam egala, iom kuntirita, la okuloj tre zorge atentis la laboron de la mano, ili nur tre malofte palpebrumis.

Tiu laboro daŭris proksimume dudek minutojn kaj dume la ĉeestantoj povis libere interparoli. Post tiu tempo, la edzo vekis la mediumon, metante la manojn sur ŝiajn okulojn. La vizaĝo faris iom malagrablan, dolorigan impreson sed la trajtoj fariĝis baldaŭ kiel antaŭe. La rezultato estis kelkaj folioj belguste ellaboritaj. Rimarkinda estis la harmonia kunmeto de la koloroj.

En posta interparolo kun la sinjorino mi eksciis, ke dum la desegno ŝi tute ne havas konscion pri la ĉirkaŭantaĵoj, sed vekiĝinte, ŝi rememoras tion, kion ŝi travivis dum la tranco. Desegnante, ŝi aŭdas el interne du « voĉojn », kiuj diktas al ŝi la kolorojn kaj gvidas ŝian manon. Unu bildon, duonkvadratmetro forman ŝi desegnas du ĝis tri monatojn, laborante potage proksimume nur duonhoron, ĉar la laboro estas tre laciga. Dum la desegnado ŝi vidas la krajonon hele radianta, kaj la krajon materialo kvazaŭ defluas sur la paperon.

En la ĉambro estis dismetitaj multaj antaŭaj laboraĵoj de tiu sinjorino. Ili montris precipe kreskaĵajn motivojn. En ĉiuj kuŝas ia neeldirebla ĉarmo kaj sendube tiu karakteriza stampo, komuna al ĉiuj mediumaj desegnaĵoj. Ni ne miru, ke en tiu okazo la laboro daŭras tiel longe, ĉar ĉiu bildo konsistas el sennombraj diverskoloraj makuletoj, kune farantaj originalan tuton.

Ni vivas en epoko de ĝenerala « nervmalsano ». Mi rigardas tiun fakton, kiel elmontriĝon de la konstanta evoluo. La facila ekscitiĝemo de la homoj montras, ke ilia astra korpo iom malligiĝis kaj ne plu estas tiel forte kunligata kun la aliaj kiel antaŭe. Tiu malligiĝo signifas ankaŭ, ke la astra korpo povas tion, kion ĝi perceptas, transmeti en la cerban konscion. Tiun povon havas la mediumoj kaj ili faras ĝin en pli aŭ malpli profunda tranco.

La pentranta medio troviĝas dum la tranco en kontakto kun diversaj estaĵoj de la astra ebena, kiuj, ankoraŭ rilatemaj kun la homoj, manifestiĝas. Komprenoble la medio altiras konforme al siaj ecoj respondan estaĵon de la astra mondo, kaj tia estaĵo trovas en la medio kvazaŭ kanalon, per kiu ĝi povas manifestiĝi.

HENRIJK MÜNCH  
Charlottenburg  
BERLIN

JENIK NOVOTN'Y

BOHEMUJO

## Universo kaj rondirado

Plej konvena simbolo de universo estas rondo, aŭ globo. «Pascal», fama filozofo kaj matematikisto, jam en deksepa centjaro diris: «Universo estas tre grandega globo, ĝia centro estas ĉie, sed ĉirkaŭo nenie.»

Ĉu povas nia limigita prudento kompreni ĉi tiun eldiron kaj tion, kio estis per tio dirita?

Ne! Tio ne estas ebla!

Simile, kiel ne povas unu centono kompreni aŭ valori la unuon, la tuton, tiel ni ne povas kompreni aŭ valori la universon.

Tute kompreni universon estas nun por ni — nur la sopiro — kiu efektiviĝas dum la eterneco.

En unua libro de Moizo, unua ĉapitro, dudek sesa verso, ni legas: Denove diris Dio: «Faru ni homon al simileco nia....» Kiel ni povas ĉi tion kompreni? Ĉu ni devas kredi ke Dio estas maljunulo kun blankaj vangharoj?

Ne! Nepre ne!

Tamen ni scias kaj en ĉiaj religioj oni kredas ke Dio estas ĉieestanta; do, kiam Li estus maljunulo Li ne povus esti ĉieestanta. Bildo de maljunulo estas nur hebrea simbolo de saĝeco kaj ĉioscienco.

Sed kion do signifas, — faru ni homon al simileco nia — kiam ni scias ke Dio ne estas maljunulo?

Tio signifas ke, homo, universo kaj ĉio en universo, estas reflekto de Dio.

Kiel estas tio ebla kaj kiel ni povas tion kompreni?

Ni vidu! Dio estas ĉieestanta. Tio estas, ke Li estas tute ĉie — ĉirkaŭ — ni.

Jam, antaŭe mi skribis ke plej konvena simbolo de universo estas globo aŭ rondo.

Tuta universo estas vivo. — Vivo estas movado. — Vivo kaj movado estas eternaj. — Eterna movado povas esti nur — rondirade. Kaj tial ni ankaŭ vidas ĉie en universo kaj ĉie sur tero la rondiradon.



Ni rigardu ?

Ĉiuj planedoj, sunoj kaj steloj estas rondoj.

Tio estas relativa reflekto de universo.

Ĉiu planedo turniĝas ĉirkaŭ sia akso.

Plue rondiradas ĉirkaŭ sia suno.

Kaj ĝia suno rondiradas ĉirkaŭ pli granda suno, kaj tiel senĉese plue ĝis en la Senlimo.

Nun ni trarigardu rondiradon sur tero kaj plejune ĉe homo.

En nia korpo fluas la sango. Tiu elfluas el koro; trafluadas vejnojn, kaj revivigita trans pulmo revenas denove en koron por nova rondirado.

Plue. Ni trinkas fluaĵojn. Parton ni forigas kun malpuraĵoj kiujn akceptas tero, alian parton ni elŝvitas kaj elspiras kiel vaporon kiun akceptas nuboj, el kiuj pluas akvo sur tero, revivigante la fontojn kaj riveretojn el kiu ni trinkas. Kaj tiel plu denove rondirade.

Ni manĝas legomojn, fruktojn kaj aliajn kreskaĵojn. Parton el tio ni per ekskremento forigas kaj tiun parton la kreskaĵojn denove bezonas por sia kreskado. Rondirado.

Riveregoj fluas maron. El maro unu parto da akvo elvaporiga kaj kiel pluvo revivigas denove riveregojn.

Dua parto interne trinkigas la fontojn kaj riveretetojn el kiuj elfluas riveregoj maron. Kaj denove ĉirkaŭen.

En arbaroj kreskas ligno. Pro sia kreskado ĝi bezonas teron, varmon kaj karbonon. Kiam ni bruligas ĝin, la ligno disvastigadas en spacon la varmon. Karbono forkuras aeron por nutri aliajn arbojn. Cindron ni denove disĵetas sur tero. Kaj tiel plu.

Do, ĉie ni vidas : rondirado. Ĉie en universo aŭ en makrokosmo aŭ en *mikrokosmo* estas movado kaj vivo.

O ! kiel belege kiel saĝe estas organizita la Universo. O ! ! kiel mistera kaj potenca estas Tiu Grandega Dio, Tiu Dio Kiu vivas ĉie. Kiu vivas en plej altaj sferoj, Kiu ankaŭ vivas en plej malaltaj estaĵoj. Ĉie kaj ĉiam estas videbla Lia grandega laboro, ĉie kaj ĉiam Lia farado kreas mirindaĵojn. Nur malfermu ni okulojn kaj trarigardu ni kun grandega humilo kaj estimo Liajn mirindaĵojn ; ankaŭ diligente ni esploru Liajn misterojn, multe da aferoj klarigos al ni, kiujn ni ĝis nun ankoraŭ ne komprenis.

Belega estas vivo kun komprenado, belega estas vivo en scio de Dio.

Vi ĉiuj legantoj volu vivi tiel el tuta koro. Via penado alportos al vi bonan rekompencan.

« Kiu postulas, tiu ricevos »

« Kiu frapas, al tiu estas malfermota ».



## Postmorte inspirita poeziaĵo de Zygmunt Krasinski

(Fragmento de la broŝuro de D<sup>ro</sup> Bronislaw Nalecz — Skalkowski, membro honora de l'vova Societo « Esperanto » — titolita : « El rememoraĵoj pri spiritismo. ») (\*)

Laŭ mia opinio, estas nediskutebla la aserto, ke homo konsistas el korpo kaj senmortema animo. Dirante : « morto » ni difinas la disiĝon de l'animo kun la korpo. Ĉesas tiam korpaj agadoj, kiujn vivigas la spirito, ĉesas antaŭ ĉio korbato kaj spirmovado, ĉesas la oksigeniga proceso de l'sango ; sekvas morto.

En normalaj kondiĉoj, animo estas forte kunligita al korpo, tiamaniere, ke ĉio formas nur plenfermitan tutaĵon — kaj ĝi ne povas komunikiĝi kun la spiritoj de homoj, kiuj jam transpasis la Rubikonon de l'morto.

Tamen, ĉiu malsano, ĉu ĝi finiĝas per morto aŭ ne, seninterligas momente la aliĝon de l'korpo kun la animo. Laŭ la vidpunkto de spiritistoj, la animoj de mortintoj estas dum longa tempo en ĉi tiu monda vivadejo de si konata. Ili opinias, ke homo senvivigita de subita morto, ne ĉiam orientas sin ke li ĉesis vivi. Oni do povas imagi, ke tiel same, kiel en iu familio, kiam estas antaŭvidata la alveno de nova membro en ĉi tiun mondon, la bondezirantaj geparencoj atendas tiun fakton kun atento kaj espero — sammaniere dum malsano, la mortintaj familianoj, aŭ tiuj, kiujn ligis amikeco kun la malsanulo, interesiĝas pri la sanstato de tiu transpasonto en alian mondon.

Tial, se la seninterliĝo de l'animo kun la korpo, ĝis tia grado antaŭeniris, tiu persono estante jam preskaŭ en alia mondo, estas vidanta kaj antaŭsentanta alimondajn aferojn kaj ĝia spirito, vivigante ankoraŭ la korpon, evidentigas tiujn sentojn per observado de l'mortintoj kaj interparolado kun ili.

---

(\*) El la supre citita broŝuro, ni eltiris nur parton, kiu enhavas nekonatan ĝis nun detalon pri la postmorta inspira agado de l'poeto Z. Krasinski, kies 100<sup>a</sup> naskiĝa datreveno estas festata ĉi tiujare en tuta Polujo.

Tamen, se malgraŭ minacaj manifestoj, la spirito estas forte ligita al korpo, la temo de ĝia delira fantazio, ne estas la afero de l'transmondo.

Nature, ĉi tio ne estas certaĵo nerefutebla, « scienca », — sed ĝi estas observinda, kaj neniuj scias, ĉu ĝi ne fariĝos kun tempkuro, unu el la prognozaj aperaĵoj.

Ne estas mia tasko pruvi en ĉi tiu rapidema skizo, la ekziston de l'animo, tamen mi devas rimarkigi, ke mi konsideras kun ia kompato, la personojn, kiuj nenion kredas ekster la materio.

Kio do estas por tiaspecaj homoj, la sentenco de tia menso, kia estis ekzemple S<sup>ta</sup> Aŭgusteno kiu diris, ke nenio en la tuta videbla mondo, lin tiom teruras, kiom lia propra memoro.

Sekve, la samaj filozofoj, kiuj konjektas nenion ekster la videbla materio kaj vidas nur en ĉio la transformiĝadon de tiu materio, kiamaniere ili akordigos tiun konvinkon kun la fakto, ke ili rememoras pri aferoj, kiuj okazis antaŭ dudek kaj eĉ okdek jaroj? La materio aliformiĝas ja ĉiam, multe pli rapide ol supozas tiuj materialistoj. Ni prenu almenaŭ tian simplan pruvon el ĉiutaga vivo: ĉu oni ne eksentas la efikon de unu glaseto da brando, verŝita en malplenan stomakon, preskaŭ tuj post ektrinko, pro rapidiĝinta cirkulado de sango en kapo? Kaj la fulmotondra agado de ciana acido? Kie do en tiu materio, tiel senĉese ŝanĝiĝanta, ekzistas loko por la memoro? Kaj sen memoro, ĉu oni povas imagi ĝenerale iun ajn progreson — jam ne tiun de l'homaro, sed de unuopa homo? Ekzistas tamen homoj, pretaj ĵuri je kelkaj senkritike legitaj libroj, eĉ tiaj, kies enhavon ne toleros preciza scienca kritiko, precipe se la aŭtoro havas multesignifan titolon. Ĉu tiuj ĉi homoj havas almenaŭ proksimuman komprenon, kiom da saĝeco sin trovas en la malgranda eltiraĵo de l'letero de S<sup>ta</sup> Paŭlo al Korintanoj I 20-21: « Kie estas la saĝulo? Kie estas la doktoro? Kie estas la esploranto de tiu mondo? Ĉu Dio ne faris malsaĝa, la saĝecon de tiu ĉi mondo? Ĉar pro tio, ke la mondo en la dia saĝeco, ne ekkonis Dion per saĝeco, tial plaĉis al Dio, per malsaĝeco de l'antaŭdirado, savi la kredantojn.

Nun mi pasas al priskribo de unu el la plej interesantaj okazintaĵoj, kiujn mi estas spertinta antaŭ dek aŭ eble pli da jaroj (ili forpasas tiel rapide!) En monato Julio aŭ Aŭgusto, dum mia familio estadis en nia somera loĝejo, mi sidis unutage, post mia kuraca ordonado, en mia kancelario kiam oni anoncis al mi la alvenon de l'Ekscelenco grafo Wojciech Dzieduszycki. (\*) La mortinta grafo estis tre kompleza por mi kaj mia familio kaj honoradis nin de sia favoro.

(Daŭrigota)

Esperantigis HELENA HEMPEL

(\*) Fama pola politikisto, aŭtoro de multaj literaturaj verkoj, ministro por la regno Galicio, delegito parlamenta, mortinta antaŭ 3 jaroj.

## Internacia Frata Kanto

Estas interkonsentite de ĉiuj esperantistoj ke Esperanto estas lingvo tute neŭtrala, sendependa de iu ajn doktrino; kaj ne povus esti alimaniere sen gravaj danĝeroj por la propagando. Ĉiu do povas ĝin uzi por siaj propraj celoj kaj por la celoj de siaj plej karaj ideoj. Tamen, pro necesa konsekvenco, pro la internacieco mem de tiu lingvo, pro ĝia interna specialeco, okazas ke ĝia praktikado naskas kaj kreskigas ĉe ĝiaj adeptoj, eĉ la plej malsimilaj pri la fako de la opinioj, senton de internacia frateco, kapablan antaŭsigni tempojn pli bonajn por nia kompatinda Homaro.

La himnon «*Espero*» oni kantas en ĉiuj esperantistaj festoj, kaj precipe en la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kun kortuŝanta kaj fervora unuanimeco. La plej patrujamantaj el ĉiu nacio ne ribelas je ĝi; kio provas ke la diversaj patrujamoj povas celi la interunuigon, ne la interbatalon.

Sub la aŭspicioj de tiu majstra ekzemplo, kies alta neŭtraleco ŝvebos ĉiam en la ĉielo de la esperantismo, ŝajnis al mi ke ĉiu analoga manifestado, ĉiu himno de frata entuziasmo internacia povus efiki favoran influon sur la evolucio de la nova sento kiu aperas; eĉ ŝajnis al mi ke eble oni povus alitonigi la naciajn himnojn laŭ sento de unuiĝo internacia, alfarante parolojn novajn en lingvo internacia Esperanto.

Estas sub la trudeco de tiu ideo, en la obsedo de la abomenoj furiozantaj en eŭropa Oriento kaj de la minacaj nuboj pendantaj super la tuta Eŭropo, malgraŭ volo de paco, — ke mi verkis dum lasta novembro provon por alitonigi la parolojn de *La Marseillaise*.

*La Marseillaise* (prononcu La Marsejz') estis devene militkanto; sed ĝi ne estis kanto de nacia egoismo. Ĝi estis la krio de la ideo nova premegita sub la reakcioj koaliciintaj. La tempoj ne estas plu la samaj, kaj la paroloj de «*La Marseillaise*» ne estas neŝanĝeblaj; sed ĝia muziko tiel genia ne devas pereii, ĉar ĝi estas alfarebla al ĉiuj grandaj movadoj de la homa evolucio. La notoj kantataj de la du unuaj versoj de ĉiu strofo enhavas magian antaŭeniradon kiu fariĝas vera ekflugo; tiuj de la du sekvantaj ŝvebas en la regionoj de la granda realigota revo. Tio estas ja.



La Marseillaise, archange aux chants aériens,

kiel diris Victor Hugo, (La Marsejezo, ĉefanĝelo kun aeraj kantoj). Poste, en la kvar lastaj versoj de la strofo, jen, laŭ premdolora modulo, la elvoko de la teruraj realaĵoj, la amasigita ĝemo de la idealo premegita. Kaj fine, jen la resalto de la rekantaĵo, kiel risorto malstreĉiĝanta : « Al la armiloj !... » Ne estis alia rimedo.

La sama sinsekvo de movoj povas esti alitonigata, alivortigata, laŭ nova sento : same ekflugo, same ŝvebantaj flugiloj, same granda ĝemo reveniganta la penson al abomenaj nunaj realaĵoj. Poste ankaŭ la resalto de la rekantaĵo... Sed ne plu per la fero ni volas venki la malbonon : ni volas ĝin venki per la frateco ardanta kaj aganta. Kaj tiu rekantaĵo nova ne estas malpli vivega ol la iama militema rekantaĵo.

Malgraŭ la diversnaciaj ŝovinismoj, ĵetantaj sian lastan elŝprucon, tutmonda sento aperas en la homaro ; kaj pro la beleco de nia komuna idealo, pro la fratiganta potenco de nia internacia komprenilo, ni penadu grandigi ĉiam pli kaj pli tiun novan senton, sen kiu la minacaj nuboj de la internacia ĉielo ne povus malaperi, sen kiu la trafo de nia altspirita celo ne povus efektiviĝi.

Jen do la provo kiun mi verkis, penante kiel eble plej ĝuste alfari la versojn al la muziko de « La Marseillaise », ne nur laŭ la muzika sento, sed ankaŭ laŭ la respondeco de la akcentitaj silaboj al la fortaj tempoj de la taktoj. Ŝajnas al mi ke, kantante, oni trovos sufiĉan akordiĝon, laŭ tiu duobla rilato, en la jena fervorkanto, senmilitigita, kaj internaciigita dank' al esperanto.

## ESPERANTA MARSEJEZO INTERNACIA FRATA KANTO

laŭ la muziko de „La Marseillaise”

### I.

Antaŭen, rasoj de l'Homaro !  
Tutmonda sent' aperas nun !  
Sur kunigan vojon sen baro  
Nin alvokas la nova sun' ! (bis)  
Ĝis nun malamo kaj kolero  
Renkontigis nin por batal',  
Kaj ŝajnis terura fatal'  
Malbenon trudi al la tero... .

Antaŭen, gefratar' !  
Ariĝu kor' ĉe kor' !  
De ni — al vi,  
De kor' al kor', verŝiĝu la fervor' !



II.

Ni semu ĉien pacan benon,  
Ni ŝutu ĝin per plena man' :  
Ni ĝermigos la novan grenon  
Por fratiĝo. mirinda pan' ! (bis)  
Tro longe la sango purpura  
Elfluis tra la sulka grund' :  
Venĝado ĝermis en la fund' !  
For de ni, semaĉo malpura !

Antaŭen, gefratar' !  
(k. t. p.)

III.

Eksonu alten nia kanto,  
El sama lingvo vasta ĥor' ;  
Kaj ni gloru per Esperanto  
La feliĉon de kunlabor' ! (bis)  
Prapatroj niaj, ne povante  
Reciproke kompreni sin,  
Bataladis blinde sen fin'.  
Ni grupiĝu peresperante !

Antaŭen, gefratar' !  
(k. t. p.)

IV.

Fervoro sankta por l'Homaro,  
Grandiĝu cia fort' en ni !  
Banu nin, kiel fajra maro,  
Ho dia flu' de harmoni' ! (bis)  
Tra lastaj tondroj de malamo,  
Tra l'nuboj de l'nuna ĉiel',  
Konduku nin al bela cel' ;  
Venkigu nin, ho supra flamo !

Antaŭen, gefratar' !  
Ariĝu kor' ĉe kor' !  
De land' — al land',  
La nova mond' fariĝos la Homar' !

J. CAMILLE CHAIGNEAU.

# LUEBLA

## ESPERANTA PSIKISTARO

Entrepreno de U E A

### ALIGILO

Al S<sup>o</sup> A. STAS

Ĉe Bureau International du Spiritisme  
WALTWILDER par BILSEN (BELGUJO)

Mi sendas kune :

\_\_\_\_\_ respondkuponojn

Ĉekon po Sm. \_\_\_\_\_

Subskribo \_\_\_\_\_

Plena adreso \_\_\_\_\_

Kotizaĵo : 1 Sm. jare, rajtigas  
je unu abono al la

**REVUO DE ESPERANTA PSIKISTARO**

## ESPERANTA PSIKISTARO

Entrepreno de U E A

### SUBSKRIBO

Al S<sup>o</sup> A. STAS

Ĉe Bureau International du Spiritisme  
WALTWILDER par BILSEN (BELGUJO)

Mi subskribas por \_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_ abonoj al la

**REVUO DE ESPERANTA PSIKISTARO**

kaj sendas kune :

\_\_\_\_\_ intern. respondkuponojn

Ĉekon po Sm. \_\_\_\_\_

Subskribo \_\_\_\_\_

Plena adreso \_\_\_\_\_

# Tarifo por anoncoj jare

1 Pago 20 Sm. = Frs 50.00	Por Francujo sola agento :
1/2 " 14 Sm. = Frs 35.00	S <sup>o</sup> L. LEFRANC
1/4 " 6 Sm. = Frs 15.00	2, Rue Brise-Miche
1/8 " 4 Sm. = Frs 10.00	PARIS (4 <sup>e</sup> )

Duoble Samideanoj vendu niajn publikajojn !

## “ ESPERANTA PSIKISTARO „ (KUNLABORADA VERKETARO)

### Resumo de la Kurso pri Teologio

de

Kavaliro Le Clément de St Marcq

Esperantigis A. STAS

Vi ricevos 10 ekz. kontraŭ sendo de 5 internaciaj respondkuponoj.

Vendoprezo : 20 cm = 8 sd.

## „ LA ONDO DE ESPERANTO ”

MONATA ILLUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909)

La abonantoj de la jaro 1912 jam ricevis **senpage** romanon de A. Tolstoj « Princes Serebrjaniĵ », kies prezo por ne-abonantoj estas **Sm. 1.60 afr.** Nun chiu abonanto de la jaro 1913, — krom 12 n-roj de l'gazeto, — **senpage** ricevos **donace** belan Esper libron :

### „ORIENTA ALMANAKO”

*el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita,  
persa, armena, kartvela, k. t. p. k. t. p.*

«La Ondo» aperas akurate la 1-an daton, novstile. Chiu n-ro havas 16-24 pagh. Formato 17 x 26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Belestrikito originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Postk. ilustr.)

### Anonco en «Koresp. Fako» — 3 respondkuponoj

La abonpagon (2 rubl. = 2,120 sm.), oni sendu al librejo « Esperanto » (Moskvo, Tverskaja, 26. Ruslando, au al aliaj Esper. librejoj — postmandate, respondkuponone, papermone, per bankcekoj au per transpag. de Esp. cekbanko.